# STARTO 174

**El la enhavo:**

8-a Kongreso de ĈEA
Nia mastrumado 1993-1995
Novaj honoraj membroj
Necesas paroli esperante
Agado de niaj kluboj
Internaciaj aranĝoj
Esperanto-muzeo raportas

1
1997

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



Tiel konenciĝis
kongreso en Havířov

☆ Starto ☆
organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio
aperas 6-foje jare. Abono 16 gld.

**Komercaj anoncoj:** 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, triobla reklamo 30% rabato.

**Membrokotizoj:** A 160 Kč, B 80 Kč, (C nuligita), D 40 Kč, E 40 Kč, F 3200 Kč, G 100 Kč (Starto), N 20 Kč, eksterlandanoj 20 ECU, enskribo 20 Kč.

**Korespondaj kursoj:** 335 Kč komencantoj, 240 Kč progresintoj. Aliĝoj: Blanka Gruntová, Vítězná 95, 784 01 Červenka-Litovel

**Libroservo:** Zdeněk Pluhař, Lamačova 658/6, 152 00 Praha, tel. 02/5817732

**Sekcioj de ĈEA:** infana, junulara, skolta, pedagogia, katolika, kristana, blindula, medicina, scienc-teknika, fervojista, ŝakista, SAT-amikara, de esperantaĵ-kolektantoj

**Komisionoj de ĈEA:** gazetara-informa, ekzamena

**Asocia adreso:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio, poŝtkesto 1069, 111 21 Praha 1, Ĉeĥio

**IČO de ĈEA:** 00 44 30 34

**Banko-konto de ĈEA:** 3330-021/0100, Komerční banka, Praha 2

**Komitato de ĈEA:**

**Prezidanto:** Vlastimil Kočvara, Ant. Sovy 10, 745 05 Opava

**Vicprezidanto:** Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 02.9912201, fakso 02.9912126

**Vicprezidanto:** Věra Podhradská, Poříčí 1, 603 00 Brno, tel. 05/4323 3047

**Sekretario:** Květa Hubnová, Esperanto, p.s. 1069, 111 21 Praha 1

**Komitatano:** Blanka Gruntová, Vítězná 95, 784 01 Červenka-Litovel

**Komitatano:** Vladislav Hasala, A. Dvořáka 1, 696 62 Strážnice, distr. Hodonín, tel. 0631/332 278, fakso 0631/332 507

**Komitatano:** Zdeněk Heiser, Na Nábřeží 45/25, 736 01 Havířov, tel. 069/6815253

**Kontrolgrupo de ĈEA:** Jana Holcová, Sportovní 2723, 276 01 Mělník (membroj: Josef Hron, Libuše Krejčí)

**Kontisto:** Jiří Patera, U Ryšánky 1534, 147 00 Praha, tel: 02.460162

**Ĉefdelegito de UEA:** Stanislava Chrdlová, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 02.9912201, fakso 02.9912126

**Redaktoro de Starto:** Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 05/4724 0690

## Variabilní symboly pro platby Českému esperantskému svazu

| | |
|---|---|
| **311** | expedice, úhrada koupených knih a materiálu |
| **604.2** | písemné kurzy |
| **604.3** | předplatné Starto |
| **604.5** | předplatné Internacia Fervojisto |
| **668** | dary svazu |
| **668.1** | dividendy |
| **694** | členské příspěvky ČES |
| **694.1** | členské příspěvky UEA |
| **789.1** | sekce mládeže |
| **789.10** | sekce šachistů |
| **789.11** | sekce sběratelů |
| **789.15** | ediční fond, Ringo |
| **789.16** | subkonta klubů mimo výše uvedených |
| **789.3** | sekce železničářů |
| **789.30** | Klub Praha |
| **789.31** | Klub Přerov |
| **789.32** | Klub Poděbrady |
| **789.33** | Klub Ostrava-Vítkovice |
| **789.7** | sekce pedagogů |
| **789.71** | členské příspěvky ILEI (jsou zároveň předplatným pro Internacia Pedagogia Revuo) |

Variabilní symbol uvádějte na přední straně poštovní poukázky, zároveň na zadní stranu do „Zprávy pro příjemce" napište účel platby. Upozornění pro majitele účtů u jiných bank! Pokud platíte z účtu u jiné banky, uvádějte nejdříve svoje jméno a bydliště, např. NOVÁK PŘÍBRAM nebo PROCHÁZKA OLOMOUC apod. Zároveň uveďte i variabilní symbol. Dojde-li platba s označením „ČESKÝ ESPERANTSKÝ SVAZ", pak vůbec nevíme kdo a proč platí. Takové úhrady účtujeme jako dary svazu.

## P.F. 1997

Znám krásné město
a v něm starý dům.
Chodím tam občas v noci
stisknout kliku,
abych si přiblížil ty,
k nimž se v dětství
vracívala moje láska.
Každý zná snad takový dům ...
A kdo jej nemá na tomto světě,
ať neztrácí naději -
očekává jej na věčnosti.

*František Kožík*

Mi konas belan urbon
kaj en ĝi malnovan domon.
De tempo al tempo mi nokte alvenas
premi la anson,
por revoki tiujn,
al kiuj en mia infanaĝo
revenadis mia amo.
Verŝajne ĉiu konas similan domon ...
Kaj kiu ĝin ne havas en nia mondo,
ne perdu la esperon -
ĝi atendas lin en la Eterno.

*František Kožík*
(esperantigis mm)

## P.F. 1997-2022

Na tebe myslím
tatínku
Noc v hlavě
listuje vzpomínku

na zmrzlé pruhy
námořníků
ze středomořské flotily

Maminku vidíš za chvíli
přímořským jasem
ozářenou

A jdou a jdou
Po pláži snů se vedou
až k chladnoucí dálce
zimních zastavení

V mlze stěží
vidíš na zem
Už nikdo není
na té cestě mrazem

*Čestmír Vidman*

Al vi mi pensas
paĉjo mia
Memoron serĉas
la nokto ebria

pri frostiĝantaj aroj
da maristoj
en la flotilo mezmara

Panjo aperas kara
per mara helo
ŝi brilas

Kaj ili iras kaj iras
la plaĝo de sonĝoj ilin gvidas
ĝis kie en malproksim'
la vintra haltejo estas

En nebulo nur penege
vi rigardas al la tero
Jam neniu restas
sur la voj' de frosthimero.

*Čestmír Vidman*

# SURSOJLE DE LA NOVA JARO 1997

**Versoj sub Kristnaska arbeto**

1
Froste neĝas Neĝe blankas la regiono
Lumigonte la kandelojn sur kristnaska arbo
rememoru nur tion kio vere belis
en strato kaj en domo via

Singardeme vi vian fiŝon manĝu
Atenteme vi forprenu la fiŝoston
Erare agas kiu sub mikroskopo serĉas
kio ne bonis Kion iu maltrafe diris

Kio malsukcesis forĵetu en la korbon
kiel la paperon nebezonatan
Ĝoju ni Denove unu nova jaro pasis for
al kiu mankis medikamentoj por vundoj niaj

2
**Kristnasko iomete pesimismema**
Kristnasko Nekristnasko
en tiu ĉi kaj en futura jaro
denove en Afriko atendas nin fiasko
Krimojn oni planas sur Balkano
Novaj Kalvarioj en Betlehemo
Ĉiam ĉiam novaj sangobanoj
De kie venas tiu diabla emo
ŝteli mensogi murdi
Ho Angloj Ho Irlandanoj
Turkoj vi kaj Kurdoj
Amon al vi feliĉon al vi geparoj

**Al amiko kiu havas problemojn**
**deziro por Nova jaro**
Al animo via bonhumoron
Realecon de la ŝajno distingi
Ke harmonio regu en domoj kaj sur la foro
Post viaj paŝoj ke la bonaj signoj restu
Por laboro via vi la rekompencon prenu
(Scias mi ke sin kaj mondon ŝanĝi malfacilas
El knabino frenezeta la saĝulinon fari
El junulo neglektema la ulon laboreman ege malfacilas)
Al vi kuraĝon Sed ne hazardkarakteran
Al vi pripensemon sed ne poltronan
Ke la tagoj ruĝiĝas Mondo pliboniĝas
kaj se ne ke almenaŭ la muelejoj Diaj
laboras pli rapide kaj pli juste

**Deziroj por ĉiuj**
Ne manku al vi kion vi ne havas
Ke korekte skribas via mano Piedoj bone kuras
Malsandiableto ne montras al vi la kornojn
Akre vidu kiu aŭton ŝoforas
Rapidu lante Ne haste
kaj ĉio malbona de vi
kaj familo via foras

*Jiří Karen*

## Ni persistu en 1997!

Finiĝis la jaro, al kiu iuj rigardis kun espero, aliaj kun certa zorgo. Mi mem antaŭ ol ĝi komenciĝis, havis ambaŭ sentojn. Zorgojn en mi naskadis preparoj de la 81-a UK en Prago - sed je ĝia sukceso mi ĉiam firme esperis. Nun, ferminte la kongresan jaron, mi povas prave diri: jes, ni ĉiuj havis multajn prikongresajn zorgojn, sed tiuj nun jam malaperis en forgeson kaj en ni restis nur plenumita espero pri kongresa sukceso. Tamen, kelkaj inter ni, asocianoj, sentas seniluziiĝon. Ili atendis, ke sukcesa tutmonda esperantista renkontiĝo iniciatos eksplodon de intereso pri internacia lingvo en nia lando. Sed ja la eksplodo ne okazas.

Sincere ni diru al ni: ni estu realismaj! La fakto, ke en milionoa urbon venas tri mil homoj, kiuj helpe de komuna (planita, facila, klara ktp.) lingvo povas tute senbariere interparoli, diskuti, babili, ridi, amuzi aŭ kulturumi, estas por multaj spektantoj interesa, certe utila kaj por kelkaj imponaj. Tion cetere atestas centoj da diversaj informoj publikigitaj en naciaj lingvoj pri la kongreso. Sed tio ja ne estas sufiĉa instigo movadiĝi por amaso da homoj, kiujn interesas unuavice laboro, salajro, vivteno, nur poste kulturo aŭ vojaĝado kaj eventuale hobioj. Kaj aparte unuajn bazajn bezonaĵojn apenaŭ Esperanto povas garantii. Spite la sukcesan kongreson restas al ni por progresigi nian movadon nur plua ĉiutaga, sistema laboro, daŭra konvinkado kaj publika prezentado de niaj rezultoj sur internacia komunikado kaj kontaktado. Kaj la kongreson ni komprenu nur kiel pinton de glacimonto kiu baziĝas sur nombraj agoj kaj sukcesoj de ordinaraj esperantistoj. Kaj ni ĝoju, ke tiu pinto aspektis vere impone kaj brile.

Estas vero, ke tian monskalan feston oni povas travivi kelkfoje dum propra esperantumado, sed apenaŭ oni povas pli foje ĝin organizi. Ni, ĉeĥaj esperantistoj, tion faris. Interesitoj konfesis, ke la laboro estis fortostreĉa, sed bela kaj interesa. Sed, ĉu ne estas bela, interesa kaj same grava labori por Esperanto en tagaj, pli modestaj cirkonstancoj, kiuj povas alporti rezultojn eĉ pli valorajn?

Neniu, do, falu en postkongresan komaton, sed ni persiste agadu kiel en periodo antaŭkongresa por plu evoluigi nian movadon, por prospero de nia verda amikaro. Kaj al tiu ĉi pena laboro mi deziras al ĉiuj membroj sufiĉe da entuziasmo sojle sur la jaro 1997!

Vlast. Kočvara

## Reklamo per afrankmaŝinstampo

Ekde 25-a de septembro 1996, la poŝtoficejo de STRÁŽNICE, distr. Hodonín, denove nun forsendas ĉiujn korespondaĵojn afrankitajn per tre okulfrapa afrankmaŝinstampo; vidu la suban bildon. Ĝi senĉese propagandas nian Lingvon kaj - kial ne? - ankaŭ la firmaon LA ESPERO de s-ano Vláďa HASALA. Pluajn detalojn vi povas ricevi rekte afrankmaŝinstampa adreso.

- vlha -

# 8-a kongreso de ĈEA en Havířov

okazis en semajnfino de 29. 11. -1. 12. 1996 en agrabla medio de Socia domo en Havířov. Samtempe Esperanto-klubo en Havířov festis sian 40-jariĝon. En vestiblo ĉiuj 130 partoprenantoj povis trarigardi ekspozicion kaj surtabligitajn kronikojn de la klubo, kiuj atestis ne nur pri riĉa agado en estinteco, sed ankaŭ pri nuntempaj aktivadoj. Jam vespere estis preparita kultura programo de klubanoj, pliriĉigita per kantoj de s-ano Sládeček.

Sabato estis ĉefa agadtago, kiun malfermis ĝojplena marŝo de knabinoj vestitaj en solenaj ruĝaj uniformoj (t.n. maĵoretoj) kaj kantoj de infana grupo el elementa lernejo. Post saluto de la vicurbestro de Havířov, ing. Jiří Slavík, je la 10-a horo, komenciĝis la kongresa traktado per vortoj de organizantoj kaj enkonduko de vicprezidanto P. Chrdle. Sekvis ĉefa referaĵo de prezidanto V. Kočvara, kiu detale informis pri trijara agado de la asocio kaj komitato. Kiel la plej aktivaj estis laŭdataj sekcioj katolika, junulara, fervoja kaj blindula (AEH staras ekster ĈEA). Bonvena novaĵo estas kunlaboro de najbaraj kluboj en formo de renkontiĝoj, ekz. Svitavy-Lanškroun-Č. Třebová, Přerov-Prostějov-Olomouc, Ostrava-Frýdek-Místek, Ústí-Liberec-Roudnice k.s. Bedaŭrinde la aktivado de pluraj kluboj male malkreskis, multaj ne kunvenas, sian raporton pri agado sendis nur 27 el 52. Laŭdata estis ankaŭ jam regula aperado de la asocia bulteno Starto, sed kritikata nesufiĉa informado pri la kluboj agadoj (la redaktoro promesis plibonigon).

La asocio havas entute 1325 pagintajn membrojn*, laŭ kategorioj: A 252 (laborantoj), B 437 (rentuloj), E 75 (favorantoj), G 104 (abonantoj de Starto), F 455 (dumvivaj membroj).

Estos starigita kapitala fonduso el postkongresa kontribuo de UEA, metita en bankon kiel netuŝebla kapitalo, kiu donos al ĈEA regulajn interezojn.

La prezidanto rememorigis ankaŭ la 7-an kongreson de ĈEA en Karlovy Vary, kies rezolucio taskigis la komitaton enketi inter la membraro, ĉu en niaj kongresoj voĉdonu delegitoj de kluboj kaj sekcioj aŭ ĉiuj plenrajtaj ĈEA-anoj, kiuj venos al la kongreso. La enketo estis publikigita en Starto 1/96. Partoprenis ĝin 54 personoj, 20 pledis por delegitoj, 20 por rekta voĉdonado kaj 14 proponis aliajn metodojn de voĉdonado (sed pri tio ne temis la enketo). Ĉar nur duono de kluboj aktivas kaj triono de la asocia membraro estas rektaj membroj, la komitatanoj aldonis siajn voĉojn al rekta balotado kaj invitis al la kongreso ĉiujn plenrajtajn membrojn kun voĉdona rajto. Aliĝis 113 membroj kaj 17 gastoj.

En tiu senco la kongreso akceptis ŝanĝon de la ĈEA-statuto, laŭ propono de ĈEA-komitato prezentita de s-ano P. Chrdle. S-ano Pokorný el Valtice proponis baloti aparte prezidanton de ĈEA, sed tiu propono ne estis akceptita kun klarigo, ke la elektitaj komitatanoj devas havi liberecon dividi inter si la funk-

ciojn laŭ siaj fortoj kaj inklinoj, post reciproka interkonsento.

Poste V. Kočvara rememorigis plej gravajn aranĝojn de ĈEA dum tri jaroj: SAT-kongreson en Strážnice 1994 (okaze de kiu aperis ankaŭ libro de K. Čapek *Milito kontraŭ Salamandroj*), IKUE-kongreson en Olomouc 1995 (aperis *Propra biografio de Karolo IV*) kaj ĉefe la 81-an UK en Prago 1996 (*Aŭdienco* de Václav Havel). Alte li aprezis la laboron de multaj helpantoj dum UK kaj de la eldonejo KAVA-PECH, kiu krom la menciitaj verkoj aperigis ankaŭ vortaron kaj lernolibron, kiuj nun reprezentas la movadon antaŭ la publiko en librovendejoj.

Financan raporton ricevis ĉiu partoprenanto de la kongreso en skriba formo, sed la kongresanoj tie konstatis plurajn erarojn, kiujn la komitato ne kapablis tuj klarigi. Nun ni publikigas la ĝustan raporton aprobitan de la financa ofico.

Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio St. Chrdlová raportis pri agado de niaj 122 UEA-delegitoj: mankas delegitoj en sudbohemia kaj okcidentbohemia regionoj, plej multajn delegitojn havas norda Moravio kaj Silezio, bohemianoj postrestas.

Kiel kulmino de la solena programo estis proklamitaj kvin novaj honoraj membroj de ĈEA: **d-ro Josef Kavka, prof. Vlastimil Novobilský, Mgr. Karel Kraft, Jiří Laube** kaj **Linhart Rýznar**.

Prezidanto de la propona komisiono Kvido Janík prezentis 11 kandidatojn por la Komitato, el kiuj ĉiu plenrajta kongresano en sekreta balotado povis elekti 7 personojn. La rezultoj estis jenaj: Podhradská (101 voĉoj), Chrdle (100), Hubnová (97), Kočvara (95), Gruntová (88), Heiser (86) kaj Hasala (60). Post mallonga kunsido ili anoncis, ke kiel prezidanton ili reelektis s-anon V. Kočvara.

Elektita estis ankaŭ nova kontrolgrupo (Jana Holcová, Jiří Hron, kaj Libuše Krejčí).

En diskuto aperis pluraj proponoj pri propagando de Esperanto aŭ pri aktivecoj de kluboj.

La sabata vespero estis dediĉita al kultura programo kun dancado, dum la dimanĉa antaŭtagmezo la kongresanoj vizitis ekspozicion de pentristo Josef Kremláček, amiko de Esperanto kaj de SET Lančov, kaj la klubejon kun videofilmo pri 20-jariĝo de ĈEA, kiu estis festata en Havířov antaŭ 7 jaroj. Estis projekciitaj ankaŭ du novaj videofilmoj kun Esperanta komentario: „Kroniko de la urbo Havířov" (30') kaj „Lignokabano Kotula" (12'). Dudekmembra grupo entreprenis busan ekskurson: en vilaĝo Šenov ili trarigardis belan barokan preĝejon, poste en Ostrava-Petřkovice tre interesan „Ministan Muzeon". Vere simbola finpunkto post la oka ĈEA-kongreso en Havířov (= Ministurbo).

Interesatoj pri kajero „Bonvenon en Havířov", eldonitan fare de la loka EK okaze de sia 40-jariĝo, skribu al Zdeněk Heiser, Na nábřeží 45/25, 736 01 Havířov.

*** La nuntempa membrobazo de ĈEA** *(temas pri pagintaj membroj, en multaj kluboj restis ankoraŭ pagontaj)*: 367 rektaj membroj, 103 Třebíč, 70 Praha, 60 Ostrava-Vítkovice, 51 Pardubice-Dukla, 50 Brno, 50 Olomouc, 32 Jablonec n/N., 32 Přerov, 31 Prostějov, 30 Opava, 28 Šumperk, 26 Třinec, 25 Havířov, 20 Hranice, 20 Písek, 20 Znojmo, 17 Liberec, 14 Karlovy Vary, 14 Plzeň, 14 Příbram, 14 Ústí n/L, 13 Náchod, 12 Benešov, 12 Česká Lípa, 11 Frýdek-Místek, 11 Lanškroun, 11 Pardubice-Schulhof, 11 Teplice, 10 Strážnice, 9 Havlíčkův Brod, 9 Polička, 9 Tábor, 9 Vyškov, 8 Nový Jičín-Libhošť, 8 Roudnice, 8 Svitavy, 8 Uničov, 8 Žamberk, 7 Český Těšín, 7 Domažlice, 7 Poděbrady, 7 Vracov, 6 Most, 6 Ostrov n/O, 6 Úpice, 5 Česká Třebová, 5 Ostrava-Poruba, 4 Děčín, 4 Jaroměř, 3 Hořice, 2 Mnichovo Hradiště, 1 Břeclav = **1325 membroj**

## Rezolucio de la 8-a kongreso de ĈEA en Havířov:

La kongreso:

1) aprobas raporton pri la 3-jara agado de ĈEA

2) aprobas raporton pri la ekonomio de la Asocio inter la 7a kaj 8a kongresoj

3) aprobas ŝanĝon de la Statuto en prezentita formo

4) akceptas elektitan novan Komitaton de ĈEA *(Gruntová Blanka, Hasala Vladislav, Heiser Zdeněk, Hubnová Květa, Chrdle Petr, Kočvara Vlastimil, Podhradská Věra)* kaj kontrolgrupon *(Holcová Jana, Hron Josef, Krejčí Libuše)*

taskas

1) la Komitaton publikigi en Starto la ekonomiajn rezultojn de ĈEA inter la 7-a kaj 8-a kongresoj

2) prezenti ekonomian raporton al la partoprenintoj de la 8-a kongreso de ĈEA

3) la redaktoron de Starto rezervi paĝon por la Komitato de ĈEA kaj enkonduki rubrikon *libera tribuno*

## Novaj honoraj membroj

Ni prezentas la unuajn du el la novaj honoraj membroj de ĈEA, la ceterajn ni proksimigos venontfoje.

**Prof. RNDr.**
**Vlastimil NOVOBILSKÝ, CSc**

Li naskiĝis 15.2.1935 en la vilaĝo Melč, distrikto Opava. Lia patro Jaroslav estis progresema instruisto kaj fondinto de ĉeĥa lernejo en Melč, kiu estis tiutempe en multe germanigita regiono - ĉi evento respeguliĝis ankaŭ en Sileziaj Kantoj de p. Bezruč en la samnoma poemo. Li estis ankaŭ pioniro de Esperanto en la regiono. Dum la milita tempo li pereis en nazia koncentrejo Mauthausen.

Vlastimil Novobilský prizorginte heredaĵon de sia patro esperantistiĝis jam en j. 1946 kaj li baldaŭ bone ekregis la lingvon, en la jaro 1951 li sukcese ekzameniĝis kiel instruisto de Esperanto. Ĝis la jaro 1953 li apartenis al gvidantoj de la movada vivo en la urbo Opava. Poste dum altlerneja

studado li aktivis en Prago kaj fine en Ústí nad Labem, kien li transloĝiĝis kaj agas ĝis nuna tempo. Profesie li estas kemiisto kaj pedagogo altlerneja, kelkajn jarojn li laboris kiel esploristo. Nun, kiel universitata profesoro li samtempe plenumas funkcion de rektoro de la Universitato J. E. Purkyně en Ústí nad Labem.

Dum sia agado en la movado li gvidis dekojn da publikaj kaj - en la Pedagogia fakultato en Ústí - internaj Esperanto-kursoj, instruis en someraj lernejoj kaj tendaroj. En 1956 li publikigis en Opava publikaĵon „Skizo pri Esperanta literaturo", poste sekvis longega vico da studaĵoj, tekstoj, artikoloj kaj prelegoj en la ĉeĥa kaj en Esperanto - tiuj enlande kaj eksterlande. Krom ĝeneralaj temoj priesperantaj li ankaŭ aplikas la lingvon fake kiel kemiisto kaj pedagogo. En tiuj ĉi fakoj li daŭre laboras sur la universitata nivelo. Li estas membro-profesoro de AIS San Marino. En sia vivo li plenumis diversajn funkciojn en lokaj, regionaj kaj tutlandaj Esperanto-organizaĵoj, laste li funkciis kiel rektoro de IKU dum la 81-a UK en Prago.

**Linhart RÝZNAR**

Naskiĝinta 5.11.1921 li esperantistiĝis en la jaro 1937 kaj la sekvantan jaron li membriĝis en la Esperanta asocio en Liberec. Post la dua mondmilito li transloĝiĝis en la urbon Svitavy, kie li vivas ĝis hodiaŭ. Tie li iniciatis fondiĝon de loka Esperanto-klubo, simile ankaŭ en la najbara urbo Polička. En la jaro 1951 li ricevis aprobon por instrui Esperanton, kiun li multfoje poste instruis en someraj kursoj kaj tendaroj en Ĉeĥoslovakio kaj sanke al uzo de Ĉe-metodo ankaŭ eksterlande (Hungario, Pollando, Germanio). Post fondiĝo de ĈEA en 1969 li fariĝis ĝia komitatano, poste ankaŭ estrarano aŭ membro de kontrola komisiono. Dum dudek jaroj li tre zorge kaj modele plenumis funkcion de ĉefdelegito de UEA en Ĉeĥa Respubliko. Li ofte vojaĝas, informas pri ĉeĥa Esperanto-movado kaj multfoje ankaŭ kontribuas al artaj kaj distraj programoj dum Esperanto-renkontiĝoj kiel magiisto. Samideano L. Rýznar estas fidela, laborema kaj oferema dumviva membro de ĈEA, kiu tute prave ricevis honoran membrecon en la asocio.

kov

## LIBERA TRIBUNO

Kontribuo al la diskuto

Kvankam mi estis skribe aliĝinta en mia aliĝilo por diskuti dum 8-a kongreso de ĈEA en Havířov, mi ne rajtis. Kial? Mian demandon neniu kuraĝis klarigi al mi. Mia temo estis EK Přerov. Mi volis unue gratuli al E-klubo en Havířov okaze de ĝia 40-a datreveno de la fondiĝo kaj poste paroli pri subteno de direktoro de Bohemia-moravia fervoja riparejo en Přerov. Li, kiu ne estas esperantisto, farigis por nia klubo flagetojn kun blazono de la urbo kaj Esperanta teksto sur unu paĝo kaj kun

signo de la riparejo sur alia flanko. Nia klubo donacis ilin al UEA-centro en Roterdamo kune kun niaj esp. tradukoj de broŝuroj, kaj ni estis certigitaj, ke tio estas ege bezonata por ili, ĉar tio montras la intereson pri Esperanto. La direktoro jam ricevis kelkajn dankleterojn el eksterlando, kaj li decidis presigi por nia klubo kalendarojn por jaro 1997, kiun ni ankaŭ sendos al UEA-centro. Mi petas ĉiujn, kiuj volas subteni Esperanton kaj kiu rimarkis dum UK en Prago niajn flagetojn kaj ricevis kalendarojn, bonvolu danki rekte al adreso de la direktoro: Jiří Loucký, ČMŽO Husova 1, 750 00 PŘEROV. Nur tiamaniere ni povas atendi denove subtenon de direktoro.

Libuše Filipová

Ĝis nun ofte ŝajnas al mi Starto tre scienca, malfacile komprenebla. Tio ofte kaŭzas malaltigi intereson pri ĝi kaj ankaŭ pri Esperanto.

Jaroslav David

Dimanĉe la 1-an de decembro 1996 mi partoprenis ekskurson al minista muzeo en Ostrava-Petřkovice, tuj post la kongreso en Havířov. Ni aŭdis valoran prelegon pri historio kaj evoluo de la minejo. Bedaŭrinde ne kompletan, ĉar kelkaj partoprenintoj rapidis al vagonaro, kaj ĉesigis la programon je unu horo pli frue.

Antonín Juřica

## EL KLUBA VIVO

**Ostrava-Vítkovice:** 11.12.96 L. Chytil pri Brazilio; 28.11.96 kunveno de sportaj kluboj inkl. klubo Esperanto; 6.12.96 Nikolaa vespero en Přerov; 8.12.96. Jarfina kunveno en Kafejo Esperanto en Frýdek-Místek; 15.1.97 L. Chytil pri Brazilo; 29.1.97 Perspektivoj de E-movado (V.Kočvara); 12.2.97. jarkunveno; 9.2.97 E-kafejo en Místek; 1.3.97, 15.3.97 Promenoj sub printempa suno; 19.3.97 Vivu Jozefoj!

**Třinec:** 5.1.97 Kion donis al mi Esperanto por la vivo kaj vojaĝado (D.Kočvara); 2.2.97 Ni kantu kiel iam en lernejo (PhDr. I. Sekařová); 2.3.97 Vojaĝo al Suda Ameriko (R. Miltrega); 6.4.97 Malsaniĝo de okulo (MUDr. M. Vlachová); 4.5.97 Ni ekkonu najbarajn landojn (A. Milatová); 1.6.97 Parizo kaj kasteloj de Loiro

**Brno:** 4.12.96 Nikolaa vespero (M.Lorková); 11.12.96 Josef Vondroušek, tradukisto (M.Malovec); 18.12.96 Nia Kristnasko (K.Daněk); 2.1.97 La movado en Perspektivo (Z.Hršel); 9.1.97 Japanio per Esperanto (J.Handlová); 16.1.97 La 8-a kongreso en Havířov (V. Podhradská); 23.1.97 Kion celas Esperanto? (M.Malovec); 30.1.97 jarkunveno

**Praha:** 2.12.96 Gramatika ripetado (E.Seemannová); 9.12.96 Ĉeĥa Paradizo (J. Mráz); 16.12.96 Zamenhof-vespero (J.Patera); 23.12.96 Kristnaska vespero; 30.12.96 Silvestra vespero; 6.1.97 Gramatika ripetado (Seemannová); 13.1.97 La jubilea jaro (Patera); 20.1. Ĉeĥa paradizo (Mráz); 27.1. Mikspoto (Mařík); 3.2.97 Gramatika ripetado

(Seemannová); 10.2.97 Komuna kantado (Maudrová); 17.2.97 Ĉeĥa paradizo (Mráz); 24.2. jarkunveno; 3.3.97 Gramatika ekzercado (Seemannová); 10.3.97 El mia Esperanta vivo (Ondráček); 17.3.97 Ĉeĥa paradizo (Mráz); 24.3.97 Komuna kantado (Maudrová)

## Esperanto-flageto

estis eldonita de Českomoravská železniční opravna, s.r.o. Přerov kunlabore kun Esperanto-klubo Přerov (ĉiu havas unu flankon de la flageto).

## Eŭropa Esperanta Kultura Semajno

okazos en la sudgermanaj urboj Aalen kaj Stuttgart (10-19.5.1997) kiel verŝajne plej granda E-aranĝo en Eŭropo 1997 (supozataj 500 partoprenantoj). Enkadre de la semajno okazos: **Esperanta Kultura Festivalo** en Aalen (10/13.5.97), koncertos *Kajto* kaj *Ĵomart kaj Nataŝa*; **Eŭropa Junulara Parlamento** (13/16.5.97) en Stuttgart diskutos kun reprezentantoj de *amnesty international, greenpeace* kaj politikistoj de diversaj partioj; **Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso** (16/19.5.97) en Stuttgart estas komuna kongreso de asocioj el Aŭstrio, Belgio, Britio, Danlando, Finnlando, Francio, Germanio, Italio, Nederlando kaj Portugalio kun diskutoj pri lingvopolitiko de EU. Aliĝoj ĝis 15-a de marto: Esperanto Stuttgart, Dachtlerstr. 21, D-70499 Stuttgart, tel. 0711/138 89 80.

**„DE KOMENIO ĜIS ZAMENHOF"** estas nomo de ekspozicio en la Ĉeĥa Centro en Varsovio dum la tagoj **28.3.-30.4.1997.** La ekspozicion okazigas Ĉeĥa Centro en Varsovio kunlabore kun Asocio de Esperantistoj-Handikapuloj kaj Muzeo de Jan Amos Komenský el Přerov (Moravio) kaj Pola Esperanto-Asocio. Ĝia celo estas prezenti al la vizitantoj aŭde kaj vide, kiel la Internacia Lingvo formiĝis kaj kiel ĝi disvastiĝas, esprimi respekton al la pioniroj de la movado kaj ĝuigi E-etoson.

Láďa Fiala
sekretario de la ekspozicio
Fügnerova 18
CZ-290 01 Poděbrady.
tel. 0042-0324/4339

## 3-a kongreso de AEH

realiĝos en Pardubice de la 11-a ĝis 18a de julio 1997 kun du tuttagaj bus-ekskursoj. La kongreso estos surbendigita kiel videofilmo.

## 82a Universala Kongreso de Esperanto

estos ĉijare „vintra", ĉar ĝi okazos la aŭstralia Adelajdo (19-26 julio 1997), sed ĝi estos vintro kiel en Kairo aŭ Bagdado. La kongresa temo „Toleremo kaj justeco en multkultura mondo" kongruas kun la landa fono, nacio formita el pluraj kulturoj. La antaŭkongreso montros plej interesajn lokojn en Aŭstralio, la postkongreso Nov-Zelandon kun maoria kulturo.

## Romantika adiaŭo kun malnova jaro

EK Ostrava-Vítkovice invitis 11.12.1996 s-anon Ludvík Chytil, kiu libertempis en Brazilo, dum 3 monatoj. Lia rakontado pri urboj, naturo kaj moroj en Brazilo kaptis nian atenton. Li travojaĝis pli ol 13.000 km kaj vizitis fame konatan farmon „Bona espero", kiun fondis kaj mastrumas esperantistoj. La restadejon, kiu estas ankaŭ 8-klasa lernejo kun ŝtata subvencio kaj deviga E-instruado, gvidas jam 22 jarojn la geedzoj Grattapaglia. S-ano Chytil vizitis plurajn klubojn kaj scias rakonti ne nur pri la esperantistaro de la tuta lando, sed ankaŭ pri la klimato, faŭno kaj pri la ĉeĥdevena urbestro de Brazilio Kubiček.

-drkoč-

## Nikolaaj vesperoj

* La 6-an de decembro 1996 okazis en klubejo de ČD Přerov Nikolaa vespero, kiun partoprenis ankaŭ esperantistoj el Prago, Č. Třebová, Ostrava-Poruba, Prostějov, Hranice, Olomouc, Kroměříž, Valtice kaj prezidanto de ĈEA Ing. Vl. Kočvara. Infanoj, Tomáš, Ivanka kaj Pavlínka, kantis por ni, s-ano Jiří Vencl deklamis poemon Manon kaj siajn bondezirojn prezentis reprezentantoj de ĈEA (V. Kočvara), IKUE (M. Šváček) kaj fervojistoj (J. Tomíšek).

Ĉar ni estis obeemaj, venis Nikolao kaj donacis al ĉiuj kalendaron 1997 de fervojriparejo en Přerov kaj kukojn el firmao Tiefenbach, kiu permesis al ni senpage pendigi montroŝrankon sur la muron de la bakejo. Alena Radová alportis fruktojn, ceteraj sandviĉojn kaj dolĉaĵojn. S-ano Chytil rakontis pri sia vizito en Brazilo kaj promesis prelegi ĉie, kien oni invitos lin.

* Similaj Nikolaaj aŭ Kristnaskaj vesperoj okazis ankaŭ en aliaj kluboj, ekz. en Brno kun tombolo, en Kafejo Esperanto en Frýdek-Místek kun kantado kaj anekdotoj, en Ostrava-Vítkovice kun rakontado de L. Chytil pri Brazilo.

## 9-a Internacia Kultura Festivalo en Ústí nad Labem (27.-29. de septembro '96)

konsistis el prelega matineo kun partopreno de poeto Jiří Karen, kies medalionon kun specimenoj prezentis prof. Novobilský kaj M. Smyčka, kaj de Drahomír Kočvara, kiu multajn interesaĵojn sciigis jam dum la vendreda interkona vespero. „Edifa travivaĵo" estis (laŭ J. Mařík) la sabataj posttagmezaj vesproj en preĝejo de Ĉeĥoslovaka husana eklezio, dediĉitaj al princo Sankta Venceslao. Proksimiĝon de religioj esprimis la moto: „Bosnio avertas: La religioj ne disigu la naciojn!" En la spirita koncerto eksonis ĥoralo sanktvenceslaa apud la husana, gotika angla legendo pri „bona reĝo Venceslao" (tr. J. Mráz), Zamenhofa „Preĝo sub verda standardo" (deklamis M. Smyčka akompanate de orgeno), plue eĉ motivoj hebreaj kaj mohametanaj. - Vespere sekvis koncerto pli leĝera kun gekantistoj K. Kudlíková, T. Fiala, M. Smyčka, klarnetistino B. Šrutová kaj pianisto J. Zimmel, en la latina aŭ Esperanto, anakŭ „Odo je ĝojo" de

Betoveno kaj nigrula spiritualo. Dimanĉa ekskurso al monaĥejo Osek haltis survoje ĉe tombo de Jiří Kořínek okaze de lia neĝisvivita 90-jariĝo. Festivalon partoprenis 63 personoj.

## 11-a Ĉeĥa-Saksa Tago (ĈESAT) en Ústí nad Labem

Sabate la 7-an de decembro 1996 okazis en Universitato de J. E. Purkyně en Ústí n. L. jam la 11-a ĈESAT kun tre riĉa kaj interesa programo. Partoprenis entute 47 gesamideanoj, inter ili 7 eksterlandanoj (el Saksio, Turingio, Hesenio, Suba Saksio kaj Slovakio). Programriĉa rangô ofertis al ĉiuj diversspecaj programeroj: antaŭtagmeze mallongajn prelegojn kaj raportojn pri E-movado el reprezentitaj E-kluboj, deklamadon de versoj (S. Chrdlová) kaj videofilmojn el ĉijara festivalo en Ústí n. L. (d-ro V. Vanc) kaj el la 81-a UK en Prago (L. Rýznar). Post la tagmanĝo s-anino E. Seemannová prezentis unuaktoran teatraĵon „Mi, Eliza Premislida, reĝino ĉeĥa". Sekvis malgranda koncerto en la reĝisorado de M. Smyčka. Krom li mem, rolis V. Urban el Ústí n. L. (pianludo) kun siaj gefiloj Zuzanka kaj Vojta (ili ambaŭ violonis), K. Kudlíková el Prago (kantado) kaj J. Zimmel el Č. Budějovice (pianludo). Post la koncerto ĉiuj sidiĝis ĉirkaŭ ornamita Kristnaska tablo kaj komune kantis kristnaskajn kantojn gitarakompanate de d-ro Z. Rusín el Teplice. Ankaŭ jam tradicie prezentis sian gajan sorĉado V. Vanc junioro.

Dum la tuta aranĝo estis por ĉiuj disponebla du ekspozicioj el la literaturaj verkaĵoj de J. Karen (Prago) kaj J. Vondroušek (Brno) kaj borso de esperantaĵoj de ges-roj Chrdle kaj de la aranĝanta E-klubo.

Ĉiloke ne eblas nomi ĉiujn unuopajn kontribuaĵojn - kaj seriozajn kaj ŝercajn - de la partoprenintoj. Tamen estis klare videbla, ke fine de tiu ĉi aranĝo brilis ne nur belege ornamita alta kristnaska arbo, sed ankaŭ ruĝetaj vizaĝoj de ĉiuj kontentaj ĉeestantoj. Ni jam nun antaŭĝojas atendante la 12-an ĈESAT '97.

- joko -

## Ostrava-Poruba

Kurso de komencantoj konsistas plejparte el junularo. La klubo abonas 10 gazetojn, kiujn post tralego donas al malpli bonhavaj kluboj. Por s-ano Divaldo Franco nia klubano tradukis libron „Feliĉa Vivo", kiu aperis ĉeĥlingve en Brazilo. Naturamika grupo aranĝis ekskursojn al montaro, ĉeestis ankaŭ internacian renkontiĝon sur monto Ĉantorio, renkontiĝojn en Velké Losiny, Nové Zámky, Dudince, Bratislava, komunan banadon en sala termala akvo en Podhájská. Ses klubanoj vizitis UK kaj ĈEA-kongreson en Havířov. Bildpoŝtkarto sendita de UK al redaktejo de la revuo „Vitalita" gajnis konkurson pri la plej interesa libertempa saluto kaj estis publikigita. En decembro estis eldonita kantareto kun 29 tradukitaj naciaj kantoj kaj kasedo kun pianakompano de nia klubano profesoro Zachoval. Okaze de Kristnasko ĝin ricevis ĉiuj klubanoj.

Lydie Klegová

## 40-jariĝo de EK en Znojmo

En 1956 fondiĝis en Znojmo klubo de esperantistoj ĉe tiama „Dům osvěty" (Kleriga domo), sub prezidanteco de Miloš Hruška. Dum 40 jaroj la klubo multon faris por disvatigado de Esperanto en la regiono. Tre aktiva kaj multjara prezidanto estis Vladimír Rotrekl, forpasinta antaŭ unu jaro. La 18-an de junio 1996 festis la klubanoj la datrevenon kun direktoro de la kleriga domo „Znojemská Beseda" Mgr. Milan Trojan kaj kun gastoj el EK Třebíč s-anoj Pavel Sittauer kaj Jan Jičínský.

Stanislav Bršlica
prezidanto de EK Znojmo

## Somera Esperanto-Tendaro Lančov

| | |
|---|---|
| 29.6.-12.7.1997 | unua etapo |
| 13.7.-26.7.1997 | dua etapo |
| 27.7.-9.8.1997 | tria etapo |
| 10.8.-16.8.1997 | libertempo sen instruado |

Kursoj:
- A - por komencantoj
- B - por progresintoj
- C - konversacia

Aliĝoj:
Esperanto-Klubo, CZ-674 01 Třebíč

## Esperanto-insigno

EK Prostějov eldonis rondan insignon 20 mm kun verda stelo, metala, lakita.

## IVa renkontiĝo de esperantistaj naturamikoj en Chrastná - motelo Jadran (30.5.-1.6.97)

Vi ĝuos romantikan migradon tra arbaroj kaj diskutadojn pri aktualaj ekologiaj temoj. Tranoktado en ĉambroj kun 2-4 litoj, unu nokto por enlandano 80-100 Kč, por eksterlandano 10 DM. Manĝado mendebla post la alveno. Ĝis **30-a de aprilo 1997** aliĝu al: Esperanto, Miloslav Jíra, Mechová 8/32, 466 04 Jablonec n/N.

## Reagoj al REFLEX

Negativa kaj stulta artikolo de J. X. Doležal pri la 81-a UK en Prago vekis inter esperantistoj multe pli grandan intereson ol artikoloj pozitivaj kaj inteligentaj (eble ni ne meritas tiajn?), siajn reagojn sendis J. Mařík, doc. P. Chrdle, MVDr. F.Rytíř, J. Rada, D. Kočvara, Ing. V. Kočvara, J. Rýznarová kaj verŝajne ankoraŭ aliaj. La artikolon kaj la publikigitajn respondojn represis la Cirkulero de nia junularo, eĉ kun la infaneca postnoto de la redaktoro: „Asi bych se měl jít bodnout. Nevíte prosím, jak se to řekne esperantsky?" (Eble mi ponardu min. Ĉu vi afable ne scias, kiel diri tion en Esperanto?)

### Kanzona recitalo en Esperanto

de Jadwiga Dziegielewska el Krakovo okazis dum la 7-a Internacia Teatra Festivalo „Ĉe la limo" (16/20.10.96) en la pola Cieszyn.

**KTI - komisiono por preso kaj informoj**

Nia dumembra komisiono ne sukcesis veki intereson ĉe ceteraj esperantistoj pri kunlaboro, kvankam multaj plendas pro nesufiĉa propagandado de esperanto. Ostrava, Pardubice kaj Brno ellaboris proprajn propagandilojn, kvankam nur provizorajn, sinjoro Zdenek Myslivec el Bozkov preparis plastikajon de dr. Zamenhof el ligno, sed ni ne sukcesis la modelon multobligi. Grava tasko de nia komisiono estas stimuli esperantistojn verki artikolojn por gazetaro kaj registri ilin. Ni ricevis kontribuojn el Praha, Vyškov, Opava, Pardubice, Strážnice, Prostějov, Přerov, Olomouc, Ostrava, Havířov, Frýdek-Místek, Znojmo, Třebíč, Brno, Ústí n/L, Č. Třebová, Náchod, Hranice kaj K. Vary. Pri Esperanto elsendis radioj de Ostrava, Pardubice, Praha kaj kabela televido de Znojmo. Informojn sendu al: Drahomír Kočvara, Hulvácká 18, 704 00 Ostrava.

**Esperantské muzeum**
**Zpráva o činnosti oddělení „Historie esperanta v českých zemích" za rok 1996**

Pokračuje se v soustřeďování historických i nových zpráv z činnosti jednotlivých sekcí, klubů, skupin a kroužků.

Největší nápor práce v esp. oddělení je evidence knižního fondu a roztřídění esperantských časopisů. Do této práce se zapojili jednorázově členové místního esp. kroužku a esp. kroužku v Lanškrouně, obětavě pomáhal i předseda ČES. Nebylo však v silách této pracovité skupiny, aby všechny časopisy roztřídila v jednom dnu. Budou nutná další pracovní setkání a s ještě větším počtem obětavců z řad esperantistů.

Rovněž není v silách pracovníků muzea (včetně dobrovolných) v současné době zpracování písemných i dalších materiálů, které přicházejí od jednotlivců. Vše je však pečlivě tříděno do skříní podle sekcí a kroužků.

V posledním období hodnotným darem byla knihovna zemřelého ing. Řebíčka, jehož otec byl nadšeným esperantistou již po I. svět. válce. Působil na ředitelství drah v Olomouci a byl jedním z členů „Moraviaj Esperanto-Pioniroj", kteří vydávali knížky v esperantu. Otec i syn vykonávali hodně v propagaci esperanta na železnici.

Zatím největším problémem esp. oddělení muzea je zpracování knižního fondu na počítači. Jedině tak můžeme zahájit výměny duplicitních knih s obdobnými muzei ve světě. Konkrétní nabídku jsem obdržel z Belgie, spolupráce byla nabídnuta i esp. muzeem ve Španělsku.

Po kongresu UEA v Praze téměř dvě desítky esperantistů z různých zemí si prohlédli s velkým zájmem sbírky E-materiálu zatím uložené v depozitáři.

V roce 1997 je reálná naděje na získání samostatné budovy pro Městské muzeum a tím se přiblíží i čas, kdy se sbírky budou moci prezentovat veřejnosti.

Jiří Pištora
ředitel muzea

## Belartaj Konkursoj de UEA en 1997

Ĉiuj konkursaĵoj devas esti novaj kaj ankoraŭ ne publikigitaj, escepte de infanlibroj.

**Poezio:** Maksimuma longo ne fiksita. **Prozo:** Maksimuma longo 200x65 tajpospacoj. **Teatraĵo:** Maksimuma longo ne fiksita. **Eseo:** Teme ligita kun Esperanto aŭ kun la temo de la 82a UK: *Toleremo kaj justeco en multkultura mondo.* **Kanto:** Teksto kaj melodioj povas esti de malsamaj aŭtoroj. **Vidbendo:** Temo prefere ligita kun Esperanto. Maksimuma daŭro 30 minutoj. Sistemo VHS/PAL. **Infanlibro de la Jaro:** Originala aŭ tradukita libro, presforme aperinta en 1996.

***Alsendo:*** Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo. Por poezio, prozo, teatraĵo, eseo kaj kanto oni sendu ilin en kvar ekzempleroj; por la infanlibra branĉo en tri ekzempleroj. Ĉiuj alvenu plej laste la **31-an de marto 1997**. Por vidbendo oni sendu po unu ekzemplero ĝis la **1-a de julio 1997.** Ĉion oni sendu al: Belartaj Konkursoj de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. La konkursaĵoj (krom vidbendoj kaj infanlibroj) estu pseŭdonimaj. La vera nomo kaj adreso estu en aparta koverto. Se eble, oni aldonu 5 internaciajn respondkuponojn por ĉiu branĉo, en kiu oni konkursas. ***Publikigo:*** La rajto je la unua presigo de la premiitaj verkoj apartenas al UEA, kiu ankaŭ poste rajtos aperigi ilin senpage en antologio de la Konkursoj.

## Provu traduki

En Starto 5/96, p. 18, estis lanĉita konkurso, kiel esperantigi ĉeĥajn frazeologiajn esprimojn *1) Koukej mazat! 2) O co ti vlastně jde?* 3) *Jemu půjčit? Ani nápad!* La redakcio ricevis du respondojn. Leganto PM proponas jenajn solvojn:

1. Zorgu pri malinvado!
2. Kion vi propre intencas?
3. Prunti al li? Eĉ ne penson!

Leganto JD esprimas la ideojn jene:

1. Forlasu min tuj. Zorgu forkuregi.
2. Kion vi vere/propre intencas?
3. Al li prunti/komisii? Eĉ ne ideo!

Solvoj de la dua frazo estas ĉe ambaŭ konkursantoj preskaŭ identaj, de la tria similaj, nur la unua tre diferencas.

Vere, la unua frazo plej multe rezistas al laŭvorta traduko (ne eblas: Gapu ŝmiri!), sed samtempe ebligas plej multajn variantojn (Forpafiĝu! Forvaporiĝu! Ekspedu vin for! Klopodu malaperi! Iru inferen! k.s.)

Ankaŭ la dua frazo ebligas plurajn solvojn laŭ situacio (Kio propre por vi gravas? Kiajn interesojn vi sekvas? Kion vi kovas / ŝpinas en la kapo? k.s.)

Ĉe la tria frazo la tradukoj *Eĉ ne penson! Eĉ ne ideo!* (kun akuzativo aŭ sen ĝi) ŝajnas al mi ĉeĥismo, kiu nelogike sekvas la antaŭan frazon. Pli taŭgaj estus: *Neniam! Neniam en la vivo! Tuj forlasu la ideon! For kun la ideo! Sensenca ideo!* k.s.

Jen ni prezentas novajn frazojn por pripensado:

*1) vzít rozum do hrsti*

*2) bloumat po ulicích*

*3) neudělal bych to ani za živý svět*

**7-a Internacia Esperanto Kongreso**
**7-a Eŭropa Esperanto-Forumo**
**56-a Hispana Esperanto-kongreso**

Valencio dum 08/13 julio 1997

**Konstanta adreso:** Grupo Esperanto de Valencia. Gran Via Fernando el Católico, 45-3a, ES-46008 VAENCIA, ES, tel./fakso: 0034/6/384 96 16, retadreso: a-casquero @redestb.es, http: //www.redestb.es/ personal/a-casquero. **Kongresejo:** Fakultato pri filologio, Avenida Blasco Ibáñez, 30, Valencia. **Kion vi trovos en la kongreso?** La kongresanoj, krom prelegojn, debatojn, kunvenojn ktp. havos la eblecon ĝui ĉiun aranĝon de la Foiro de Julio de Valencia, kaj de la Internacia Festivalo de Blovorkestroj, kiuj koincidas kun la kongreso, kaj kio permesos ĉeesti koncertojn, kavalkadojn, teatron, tradiciajn kaj folklorajn aranĝojn, mirindajn artfajraĵojn ktp., la plejmulton tute senpage.

Valencia, urbo kun preskaŭ unu miliono da loĝantoj, rande de la maro, dum multaj jaroj loko transpasata de ĉiaspecaj turistoj vojaĝantaj al la Blanka aŭ al la Suna Marbordoj, estas turisma allogo per si mem, kun altiro kiu ne estas limigita al la someraj monaroj. *(vlha)*

**14a Ĝenerala Konferenco de MEM**
okazos 17-19. 5. 1997 en Hungario, en Kulturdomo „LÁNG", Budapeŝto, XIII. Rozsnyai u. 3. La partoprenkotizo 60 USD depende de la inflacio (2 tranoktoj, manĝo). Aliĝo (ĝis 31.3.97): E MOVILO, Budapest, Nyírpalota u. 107, H-1157, tel. (36.1) 271-9510.

**Esperantologia konferenco**
efektiviĝos 17/18.4.1997 ĉe la Katedro pri Ĝenerala kaj Aplika Lingvistiko de la Filologia Fakultato de Universitato Eötvös Loránd (H-1052 Budapeŝto, V, Piarista köz 1) kun prelegoj pri lingvo, literaturo, kulturo, movado kaj instruado de Esperanto.

**49-a IFEF-kongreso**
okazos en Košice (10/17.5.1997) en hotelo Strojár. Por ĉeĥoj validas kongresa kotizo por ekssocialismaj landoj (ĉ. 700 SK), la tranoktado inter 100 SK - 310 SK laŭ dezirata kvalito. Post la kongreso vi povas partopreni restadon en Altaj Tatroj (17/24.5.1997).

**Kolektantoj renkontiĝos**
ESPERANTO Klubo STRÁŽNIČAN en Strážnice, distr. Hodonín, organizas sabate, la 26.04.1997, *Renkontiĝon de Kolektantoj* en la urba Kulturdomo STRÁŽNIČAN. Pluajn informojn rekte ĉe: ESPERANTO, poŝtkesto 36, 696 62 STRÁŽNICE, distr. Hodonín, tel.: 0631/942 762, 942 905.

**Baza Informilo**
**pri Esperanto-Junularo**

ellaborita de la medicina studento Thomas Pusch, ĝis 1995 Estrarano de TEJO pri informado, ekzistas jam en 40 lingvoj, inter ili ankaŭ en la ĉeĥa kaj slovaka. Ĝi konsistas el tri partoj: Kio estas Esperanto, Kial lerni Esperanton, Kiel lerni Esperanton. Kaj kompreneble enhavas adreson de la landa E-junularo.

## Ni legis

**Unua Azia Kongreso** - 21.-25. aŭg. Ŝanhajo - partoprenis 584 homoj el 18 landoj. Ĝi okazis en la preskaŭ plena aŭditorio de la Komerca Centro. La ĉefa temo estis „Azio kaj la 21-a jarcento." Ĝi estis pritraktita en kvar subtemoj: ekonomio, scienco, edukado kaj E-movado. Kunsidis medicinistoj, gi-ŝatantoj, Oomotanoj, fervojistoj, komercistoj kaj ekonomiistoj. Oni pritraktis temojn, kiujn ne nur esperantistoj alfrontas en la ĉiutaga vivo: „seksa diskriminacio kaj virino" aŭ la historion de la rilatoj inter Japanio kaj Koreio. La Komisiono pri Azia E-Movado (KAEM) elektis por la Dua Azia Kongreso en 1999 Vjetnamon. Neforgesindas la sinofero de LKK kaj de KAEM, kiu fundamentis la sukceson de la kongreso. KAEM-anoj preparkunsidis tri fojojn kun LKK-anoj, flugintе al Ŝanhajo proprakoste. Montriĝis, ke pli grandan ĉeeston de favorantoj de Internacia lingvo baris precipe multekostaj trafikelspezoj en Ĉinio. Laŭ kritiko de Yamasaki Seiko (Jap) komercismo kolorigas la tutan ĉinan socion; venis ankaŭ lingve nespertaj partoprenantoj, kiuj sekvis nur sian komercan celon.

**IEM (Internacia Esperanto-Muzeo)** - novaĵoj: Ĝi situas en Vieno-Hofburg (Josefplatz 1, AT-1015) kaj ĉijare la nombro de libroj atingis 21.000. Krome estas ekspoziciitaj 40.000 flugfolioj, 10.000 fotoj, 353 sonbendoj, 1.000 afiŝoj, 12.000 gazet-eltondaĵoj ktp. La librojn oni povas pruntepreni pere de internacia prunta servo (universitataj kaj sciencaj bibliotekoj). Publikaj horoj lunde, merkrede, vendrede 10-16 h. En sept. fermita. Nun la biblioteko estas transformita al komputoro kaj Interneto. Necesas diri, ke dank' al datumbankoj alvenos la horo de la vero: evidentiĝos, ĉu la esperantistoj bezonas tian bibliotekon aŭ ne. Se ili ne utiliĝos la datumbankojn, tiuj malaperos rapide. Oni povos tre rapide kontroli, ĉu ili estas utiligataj. Se esperantistoj ne vizitos ilin por elsuĉi la necesajn kilobajtojn, jen estos fino. Tio minacus la ekziston de IEM entute. En tempo de rigora ŝparado ne estos mono por luksaĵoj.

**Ĉu komisiito pri arabaj landoj?** Esperanto apenaŭ ekzistas en arabaj landoj. La situacio povus iom pliboniĝi se troviĝus volontulo por estri komisionon pri arabaj landoj. Necesas kontakti jam esperantigitajn homojn, teni la kontaktojn kun ili, motivigi ilin propagandi, kolekti jam ekzistantan materialon ktp. Kandidatoj klarigu, kial vi interesiĝas kaj kion vi povas fari, al vicprezidanto de UEA Rene Triole, 4, impasse de Charpentiers, FR-57100 Thionville, Francio.

The **Prague Post** (28.aŭ.-3.sept.) - semajna anglalingva gazeto dediĉis du paĝojn al la raportaĵo pri UK en Prago.

**Amatoreco en la prelegoj** esperantaj manifestiĝas laŭ Oszkár Princz precipe en **citado** sen indiki la fonton, en **uzado** de terminoj kvazaŭ ili estus konataj al ĉiuj aŭ estus vaste akceptitaj kaj en **komparo** de du starpunktoj pri la rolo de Esperanto sen aludi pri kritikoj de aliaj verkantoj pri la sama temo. La aŭtoro en pleda respondo al la artikolo de s-ano Sikosek („For la esperantan

sektismon!) demandas, kion li volas per E-o: Ĉu plibonigi la mondon? Ĉu konstrui internacian komunumon kun komuna lingvo? Ĉu konstrui komunumon kun la komuna, ĉefa lingvo E-o? Ĉu uzi E-on por faciligadi la komunikadon inter diverslingvanoj - aŭ ion alian? Estus inde provi trovi tiun minimumon pri kiu ĉiu esperantisto konsentas, por ke la celo de E-o estu prezentebla al neesperantistoj. - Jen temo por diskuto en niaj rondetoj.

**Verda Familio adiaŭas.** La rubrikon *Ni legis* preparis d-ro Josef Hradil, kiu ĉesis eldonadi sian bultenon *Verda Familio.*

## Zamenhof-festo en Vieno.

Pola Instituto en Vieno kunlabore kun Aŭstria Esperanto-Asocio aranĝis sabate (14.12.1996) en la Pola Instituto am Gesade 7, 1010 Vieno, tradician Zamenhof-Feston je la memoro de la 137-a naskiĝdatreveno de d-ro L.L.Zamenhof. Partoprenis reprezentantoj de la Esperanta Redakcio de Radio Vieno kaj vico de E-organizoj kaj gastoj el Aŭstrio kaj aliaj landoj kiel Ĉeĥio, Slovakio, Pollando kaj aliaj, eĉ Japanio.

Post salutvortoj de Mag. Alicja Kowalska, la vicdirektorino de la Pola Instituto, kaj Emil Vokal, la vicprezidanto de Aŭstria Esperantista Federacio, oni aŭskultis la unuan parton de la koncerto fare de polaj kaj japanaj artistoj. Pola kantistino Agnieszka Gertner kantis kelkajn kantojn de Scarlatti, Paisiello, Stolz kaj Sieczynski kaj rikoltis longajn aplaŭdojn.

Poste sinjoro Emil Vokal kortuŝe parolis pri la vivo kaj verko de d-ro Zamenhof kaj pri liaj streboj por paco kaj interpopola amikeco helpe de facila komuna internacia lingvo.

Univ. prof. d-ro Hans Michael Maitzen prezentis interesajn rememorojn pri la 81-a UK en Prago, kiun li aktive partoprenis, kaj pritraktis valoron de la tie akceptita Praga Manifesto. Kun intereso oni aŭskultis ankaŭ rememorojn de la sepjara Kamil Reinvart, filo de slovaka diplomato en Vieno, pri liaj rememoroj pri la Infana Kongreseto en Prago, kaj raporton de lia fratino, dekjara Bibiána Reinvartová, pri la 18-a Renkontiĝo de la E-familioj en Bratislava.

Sekvis la dua parto de la koncerto kun Danksonato de S. Prokofjev kaj bukedeto de belaj kantoj en prezento de Agnieszka Gerstner, inter kiuj ne povis manki la bone konata Kristnaska kanto de F. Gruber. La oficialan parton de la programo oni finis per komuna kantado de la Zamenhofa himno. Sekvis projekciado de pola filmo „Tio estas Varsovio", bedaŭrinde kun germanlingva komento.

Dum amika interparolo kun regalo de bongustaĵoj kaj trinkaĵoj, prof. Katinjo Fetes-Tosegi informis pri elsendoj de ÖRF, Leopold Patek pri la ĝisdata stato de Eŭroparlamentanoj, ni invitis partopreni (6/9.5.1997) en Hodonín, Uherský Brod (muzeo de Komenio) kaj Bratislava la Antaŭkongreson de la 49-a IFEF-Kongreso. Multe plaĉis kolora kalendaro 1997 eldonita de EK Přerov kunalbore kun Jiří Loucký, direktoro de fervojista riparejo en la sama urbo.

*Jindřich Tomíšek*

## El la historio

**Komenco de la ĉeĥa E-movado.** En la ĉeĥlingva gazeto „Nový život" (Nova Vivo) en 1901 informis Marie Kavánová pri lernolibro de Esperanto, mendebla ĉe Th. Čejka en Bystřice pod Hostýnem. Timon antaŭ artefariteco ŝi komparas kun timo de skribisto uzi ŝtalan plumon anstataŭ la ansera aŭ kun timo de dronanto kroĉiĝi al artefarita ŝnuro, kiun oni ĵetis al li.

**Dankletero de Petr Bezruč.** Estis trovita letero propramane skribita de Petr Bezruč 28.X.56 al Dr. Kamila Hartlová, en kiu la poeto dankas ŝin pro deklamo de liaj poemoj al eksterlandaj esperantistoj en Třebíč. *(drkoč)*

## Pri neceso paroli esperante

*Zamenhof, St. Petersburg 1910:*

„Niaj kongresoj ne sole la universalaj, sed ankaŭ la naciaj, havas antaŭ ĉio signifon instruan kaj edukan. Esperantistoj disĵetitaj en diversaj urboj kaj urbetoj kunvenas en pli aŭ malpli granda amaso, por aŭdi nian lingvon, por kontroli, ĉu ili ĝuste ellernis la lingvon, ĉu ili bone ĝin komprenas, por kompari sian propran manieron de parolado kun la parolmaniero de pli spertaj esperantistoj. Kiam ili poste revenas hejmen, ili ne sole mem parolas pli pure, sed ili alportas modelon de bona parolado al tiuj, kiuj restis hejme. .... Eĉ interne de la esperantistaj grupoj oni ofte ne kuraĝas paroli esperante, oni balbutas, oni preferas paroli en sia nacia lingvo, kaj proporcie al la nekuraĝeco de la parolado aperas ankaŭ nekuraĝeco de propagando, ĉar la esperantistoj-balbutantoj malgraŭvole ne povas liberigi sin de la timo, ke eble tamen Esperanto estas afero pli teoria, ol praktika. Sed kiam la balbutanto venas al kongreso, kie li havas la eblon aŭdi bonajn kaj spertajn esperantistajn oratorojn, kiam li per siaj propraj oreloj kaj okuloj konvinkiĝas, kiel bele kaj flue oni povas paroli en Esperanto, li entuziasmiĝas, li vidas, ke li laboras por io viva kaj vivoplena, li revenas hejmen kun nova kuraĝo kaj energio."

La 8-a kongreso de ĈEA en Havířov ne plenumis ĉi tiun rolon. La partoprenantoj ekzerciĝis antaŭ ĉio en la ĉeĥa lingvo. Esperante parolis nur kelkaj diskutintoj. Uzo de Esperanto estis malofta escepto. Ankaŭ ekster la kongresejo oni tre malmulte aŭdis Esperanton.

Ĉu nia propagando ne estus pli efika, se ni uzus Esperanton? Se iu interpretus al la vicurbestro de Havířov, pri kio ni parolas, kaj lian parolon tradukus en Esperanton, ĉu tio ne estus plej demonstra ekzemplo, al kio servu Esperanto?

Ĉirkaŭ ni en la kongresejo kaj ekster ĝi estis multaj neesperantistoj. Se ili aŭdus nin interparoli pri ĉio en Esperanto kaj eĉ amuziĝi en tiu lingvo, ili informus en sia ĉirkaŭaĵo pri nia afero pli propagande ol ĉiuj niaj paroloj pri utileco de Esperanto.

Ni devus konscii, ke parola lingvo estas la bazo de iu ajn lingvo, do ankaŭ de Esperanto. Se ni volas, ke Esperanto samrangu kun aliaj lingvoj, ni devas ĝin ekposedi, esprimiĝi en ĝi, pensi en ĝi, uzi ĝin tute senĝene, aŭtomate, memkompreneble kiel nian patrinan lingvon.

Josef Mendl

**Kunveno pri komercado**
organizita de EK Vítkovice pri kromlaboro de kelkaj membroj, kiuj disvendas produktojn de Morta maro, kosmetikaĵojn de firmao AVON aŭ murkalendaron por 1997 kun TV-serio de familio Simpson, montris novajn eblojn de enspezoj kaj riĉigis vortprovizon pri komercaj terminoj.

**Avantaĝa propono por esperantistoj**
En kazo de tradukbezono de dokumentoj en aŭ el la ĉeĥa, franca, rusa mi uzas por esperantistoj minimumajn leĝajn prezojn. Jure agnostika tradukisto Ing. Zdeněk Polák, 561 25 Rudoltice 95, tel. 0467/6778

**Ĉeĥlingva gazeto pri KAVA-PECH**
Gazeto *Internet 4U*, kiu informas pri la internacia komputila reto Internet, intervjuis posedanton de la firmao KAVA-PECH, docenton Petr Chrdle, pri liaj spertoj kun Internet kaj pri lia apliko de Esperanto en la reto. La legantoj eksciis, kiel ili povas per Interneto akiri informojn pri E-movado en la mondo kaj kiajn verkojn la firmao eldonas.

## Korespondi deziras

Mi interesiĝas pri uzitaj poŝtmarkoj de la nova Ĉeĥa Respubliko: Santiago Martin Relea, Fray Juan 25-6-K, 480 13 Bilbao, Hispanio

**Korespondu kun japanaj esperantistoj**
Japana Koresponda Servo proponas peri skribajn kontaktojn sub jenaj kondiĉoj:
a) **mem** skribu korespondopetan leteron **per via propra lingvoscio**, ĉar de tio dependas taŭga korespondanto
b) nepre menciu vian **sekson** kaj **aĝon**
c) almenaŭ **nomon** kaj **adreson** skribu skribmaŝine aŭ preslitere
d) por ŝpari sendokostojn povas en unu koverto esti pluraj petleteroj, sed por ĉiu persono **aparte**; ni malakceptas grupan liston de petantoj, ĉar ne eblas juĝi la linvosciojn de unuopuloj kaj ĉar multaj grupanoj ne respondas.
Skribu al: Koresponda Servo de Japana Esperanto-Instituto, Tôkyô-to, Sinzyuku-ku, Waseda-meti 12-3, Japanio.

## Ni gratulas

13-an de decembro 1996 atingis 70-jariĝon **Miloslav Jíra**, multjara prezidanto de la klubo en Jablonec n/N, organizanto de sennombraj renkontiĝoj de esperantistoj kaj naturamikoj, propagandisto precipe inter junularo.

## Ni kondolencas

12.11.1996 estis kremaciita Květa Novotná, 67-jara, iama aktivulino de Ostrava-junularo.

## Svaz hledá nebytové prostory

Svazové materiály, převážně knihy, jsou v současné době uskladněny v provizorních vlhkých podmínkách, ve kterých jim hrozí zkáza. Proto svaz hledá vhodné prostory (cca 2x40 m²), např. v domě některého člena, kde by našly útočiště. Nabídky zasílejte na svazovou adresu.

**Upozornění! Toto je poslední číslo Starta, které dostávají ti, kteří nemají zaplaceny příspěvky na rok 1997.**

**Přehled hospodaření Českého esperantského svazu za funkční období 1993 - 1995 schválený finančním úřadem.**
(Rok 1993 zpracovala paní Minaříková, roky 1994 a 1995 Jiří Patera)

| **Příjmy** | **1993** | **1994** | **1995** |
| --- | --- | --- | --- |
| Členské příspěvky | 76.634,- | 61.606,- | 65.662,- |
| Tržby (prodej materiálu) | 54.890,- | 51.644,- | 88.312,- |
| Písemné kurzy | 7.177,- | 4.253,- | 4.934,- |
| Člen. příspěvky UEA | 19.234,- | 12.658,- | - [4) |
| Předplatné časopisů | 17.141,- | 11.087,- | 2.025,- [4) |
| Dotace Ministerstva kultury [8) | 47.000,- | 150.000,- | 60.000,- |
| Mimořádné akce | 167.670,- [1) | 88.365,- [2) | 107.731,- [5) |
| Ostatní příjmy | 77.769,- | 96.004,- | 25.758,- |
| **celkem** | **467.515,-** | **475.617,-** | **354.422,-** |

| **Výdaje** | **1993** | **1994** | **1995** |
| --- | --- | --- | --- |
| Mzdy | 73.951,- [7) | - | - |
| Nemocenské pojištění | 31.838,- [7) | - | - |
| Ostatní osobní výdaje | 38.990,- | 31.422,- | 29.433,- |
| Nájemné | 30.084,- | 30.684,- | 600,- |
| Cestovné | 20.173,- | 42.136,- | 15.166,- |
| Poštovné, telefony | 34.951,- | 25.618,- | 61.699,- |
| El. energie, vodné, plyn | 16.492,- | 14.037,- | -8.208,- |
| Vydavatelská činnost | 43.892,- | 34.532,- | 80.738,- |
| Mimořádné akce | 212.097,- [1) | 149.212,- [3) | 184.096,- [6) |
| Ostatní výdaje | 98.642,- | 57.790,- | 144.855,- |
| **celkem** | **601.110,-** | **385.431,-** | **508.379,-** |
| **Hosp. výsledek (+ úspora, - ztráta)** | **-133.595,-** | **+90.186,-** | **-153.957,-** |

**Vysvětlivky:**

1) kongres Karlovy Vary

2) SAT-kongres 71.838,-
konference ČES 16.527,-

3) SAT-kongres 121.989,-
konference ČES 27.223,-

4) zajišťováno mimo ČES

5) konference ČES 19.803,-
UK 87.928,-

6) IKUE-kongres 9.282,-
konference ČES 34.350,-
Video-festival 70.654,-
UK 69.810,-

7) v roce 1994 skončil pracovní poměr ing. Z. Pluhaře

8) dotace ministerstva kultury se přidělují na konkrétní kulturní akce, takže je musíme přičíst k příjmům Karlových Varů, SAT-kongresu a IKUE-kongresu

## KLUBOJ EN ĈEHIO
**(korespondaj adresoj)**

**Benešov:** Václav Stibůrek, J. Franka 1731, 256 01 Benešov u Prahy. **Brno:** Klub esperantistů, pošt.přihr. 154, 657 54 Brno 2, tel. 747497 (předseda). **Břeclav:** Delpo Zeno, Fintaj 4/18, 690 00 Břeclav, tel. 0627/23080. **Česká Lípa:** Hana Vencovská, Okružní 2100, 470 01 Česká Lípa. **Česká Třebová:** A. Pištorová, Nové náměstí 1746, 560 02 Česká Třebová. **Český Těšín:** Vladimír Štefek, Tovární 8, 737 01 Český Těšín, tel. 0659/563352. **Děčín:** Oldřich Antoš, Široká 91, 405 05 Děčín IX-Bynov. **Domažlice:** Vojtěch Tesař, Pod makovým vrchem 480, 345 62 Holýšov. **Frýdek-Místek:** Marie Bartovská, Bezručova 171, 738 02 Frýdek-Místek, tel. 0658/31625. **Havířov:** Jarmila Wiatrová, Na svobodě 3193, 723 00 Ostrava-Martinov, tel.: 069/447416. **Havlíčkův Brod:** K.D. OSTROV 28, 581 01 Havlíčkův Brod, tel. 0451/24998, 21088. **Hořice v Podkrkonoší:** s-ro František Patera, ČSA 1027, 508 01 Hořice v Podkrkonoší, tel. 0435-2892. **Hranice:** Alois Jakubec, Tř. 1. máje 1622, 753 01 Hranice. **Jablonec:** Miroslav Jíra, Mechová 8-32, 466 04 Jablonec nad Nisou. **Jaroměř:** Ludvík Nyklíček, K. Světlé 2149, 544 01 Dvůr Králové, tel. 0437/5303. **Karlovy Vary:** Ing. Miloš Bloudek, Vyšehradská 4, 360 01 Karlovy Vary tel. 017-288173 (7-15.30 h). **Lanškroun:** Eliška Kunertová, Škroupova 497, 563 01 Lanškroun, tel. 0467/2960. **Liberec:** Esperanto-klubo, pošt. schr. 194, 460 01 Liberec. **Mnichovo Hradiště:** MUDr. Josef Hradil, MH, Družstevní 1161, 295 01 Mnichovo Hradiště tel. 0329/7713394. **Most:** Jiří Rada, Rybalkova 1029, bl. 645, 434 01 Most tel. 035-34-3931. **Nový Jičín:** Rudolf Šindler, 74257 Nový Jičín-Libhošť 359. **Olomouc:** Dr. Vladimír Mohapl, tř. Svornosti 4, 779 00 Olomouc tel. 068-413435. **Opava:** Ing. Jan Kovařík, V zátiší 10, 747 05 Opava-Malé Hoštice, tel. 0653-217522. **Ostrava-Poruba:** Ludmila Klegová, Žilinská 1311, 708 00 Ostrava 8, tel. 069/4409665. **Ostrava-Vítkovice:** Esperantský klub Vítkovice, Drahomír Kočvara, Hulvácká 18, 704 00 Ostrava-Zábřeh tel. 069/351664. **Ostrov nad Ohří:** Josef Novosad, Masarykova 782/14, 363 01 Ostrov. **Pardubice-Dukla:** Ludmila Srbová, Prodloužená 264, 530 09 Pardubice, tel. 040/42592. **Pardubice-Schulhof:** Esperanto, Na Okrouhlíku 953/21, 530 03 Pardubice, tel. 040/21475. **Písek:** sekret. SD-LSNS, Fügnerovo nám. 42, 397 01 Písek. **Plzeň:** Jiří Vomáčka, Koterovská 30, 301 41 Plzeň. **Poděbrady:** Pavel Polnický, Lesní 150/VI, 290 01 Poděbrady, tel. 03245651. **Polička:** Ing. Blahoslav Štefek, Dukelská 376, 572 01 Polička tel. 0463/22774. **Praha:** Klub esperantistů, pošt. schr. 1069, 111 21 Praha 1 **Prostějov:** Esperantský klub, Husovo nám. 85,796 04 Prostějov. **Přerov:** Libuše Filipová, Nádražní 146, 768 11 Chropyně. **Příbram:** Jaroslav Vácha, Smetanova 225, 261 01 Příbram. **Roudnice:** Jiří Laube, Kratochvílova 969, 413 01 Roudnice n.L., tel.: 0411/3366. **Strážnice:** Esperanto klub KD "Strážničan", Veselská 1321, 696 62 Strážnice, okr. Hodonín tel.: 0631/942 762, 942 905. **Svitavy:** Marie Minářová, Na průhonu 6, 568 02 Svitavy. **Šumperk:** Věra Gavandová, Komenskéo 657, 789 61 Bludov. **Tábor:** Dr. František Rytíř, Kvapilova 2294/35, 390 03 Tábor tel. 0361/32074. **Teplice:** Dr. Zdeněk Rusín, Palackého 1559, 415 01 Teplice. **Třebíč:** Esperanto, ul. Esperantistů, 674 01 Třebíč tel. 0618/3257. **Třinec:** Anna Milatová, Husova 304, 739 61 Třinec tel. 226 11. **Uničov:** Štefan Takáč, ul. Bří Čapků 1158, 783 91 Uničov. **Úpice:** Lubomír Středa, Poděbradova 82, 542 32 Úpice. **Ústí nad Labem:** Ing. Josef Kříž, Družstevní 411/11, 400 07 Ústí nad Labem, tel. 047/5500283 fakso 047/5210503. **Vracov:** Jana Melichárková, 696 02 Ratíškovice 938, tel. 628/967404. **Vyškov:** Ing. Josef Vojáček, Sochorova 13, 682 01 Vyškov, tel. 0507/22053 **Znojmo:** Stanislav Bršlica, Bolzánova 31 B, 669 02 Znojmo. **Žamberk:** Karel Čada, Ke střelnici 881, 564 01 Žamberk, tel. 2741

Odesílatel:

Český esperantský svaz
ESPERANTO, p. s. 1069
111 21 Praha 1
☆ **STARTO** ☆

Periodikum Českého esperantského svazu (28. ročník)
Redaktor: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno
Členská evidence a změny adres: Květa Hubnová, ČES Praha

---

Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio (28-a jarkolekto)
Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio
Abonprezo: 15 gld
Redaktoro: Miroslav Malovec, Bosonožská 15, 625 00 Brno, Ĉeĥio

---

Podávání novinových zásilek povoleno
Českou poštou, s.p., Odštěpným závodem Severní Morava,
č.j. 1533/95-P/1 ze dne 3. 8. 1995

# NOVINOVÁ ZÁSILKA

Poštovné hrazeno v hotovosti
u pošty 746 01 Opava 1

KOČVARA VLASTIMIL
A. SOVY 10
747 05 OPAVA 5